

**paket'** Rab 42,2 : Prenu, tiun ĉi *paketon*. — Ham 157,5-9 : mi ... forkaptis la *paketon*, kiun ili kun si tre garde portis ... Mi dissigelis la *paketon*. — FK 215,21 : ĉambron ..., kiu tuta estas plenigita de *paketoj*.

**panik'**

**panto**

**senser**

**la scen**

**parag**

**parag**

**parale**

— FK

FK 280,21

**parlament'** FK 87,11 : prezidanto de la *parlamento* en la Provenco.

**paroksism'** Rab 82,11 : Nur paciencon, la *paroksismo* komencas jam fali.

**parti'** [en la aparta senco de persono edziĝonta, kiun oni konsideras laŭ ĝia rango aŭ stato]. — Rev 88,16 : Anna Andrejevna efektive atendis bonan *partion* por sia filino.

**passaĝer'** Rab 59,26 : *Passaĝeroj* en la arbaro.

**pasiv'** FK 255,12 : Ĉiuj formoj de la *pasivo* estas formataj per helpo de responda formo de la verbo *esti* kaj la participo *pasiva*.

**paskvil'** Rab 29,4 : oni rigardus ĝin kiel malamikan *paskvilon* kontraŭ la homa gento.

**pastoral'** Ham 64,16 : por tragedioj, komedioj, historioj,

Alfred-E. Wackrill

# Zamenhofaj Vortoj

En 1908 Netroveblaj en la  
Universala Vortaro

⟨*ea*⟩

Esperanto  
Akademio



# **ZAMENHOFAJ VORTOJ**

Wackrill, Alfred E. (red.). Zamenhofaj Vortoj (Paris 1908). Kun enkonduko de Bernhard Pabst. 1a reeld. Berlino: Esperanto-Akademio 2017.

Stato 2017-04-13. © por la reeldono 2017 Bernhard Pabst.

Kontakto [bernhard.pabst@esperanto-akademio.de](mailto:bernhard.pabst@esperanto-akademio.de) (anstataŭigu „[e]“ per „@“).

Retejo: <http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>

En sama formo aperis aliaj volumoj de la Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto, vd. la apudan liston. Ĉiuj volumoj estas senkoste elŝuteblaj de

<http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>.

# ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO.

## ESPERANTISTA DOKUMENTARO

PRI LA OFICIALAJ, HISTORIAJ, BIBLIOGRAFIAJ KAJ STATISTIKAJ AFEROJ.

**Kajero oka**

(Aŭgusto 1908).

I.

*OFICIALA PARTO*

**SEKCIO B : LINGVA KOMITATO.**

*Raportinto : ALFRED-E. WACKRILL.*

**4.**

# ZAMENHOFAJ VORTOJ

**NETROVEBLAJ EN LA UNIVERSALA VORTARO**

TIRITAJ EL

*Ekzercaro, Hamleto, Fundamenta Krestomatio, la Revizoro  
kaj la Rabistoj, kun citaĵoj.*

Prezo : unu franko.

**PARIS,**

**ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO**

51, RUE DE CLICHY, 51

**1908**



## Enkonduko

---

La „Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro“ de 1909 (OA 1) havas jenan noton:

„La steleto \* montras la vortojn cititajn en: A. E. WACKRILL: *Zamenhofaj Vortoj* (Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris). La ekzemploj en tiu verko tre ofte plene klarigas la sencon aŭ sencojn. — ...“.

La konkordanco de 1908 tial estas grava helpilo por ĝuste interpreti multajn vortojn, de 1909 Fundamentajn. Sed ne nur: Ĝi enhavas ankaŭ vortojn aldonitajn al la Fundamento de Esperanto per ĉiuj postaj Aldonoj, ĉefe per OA 2 (ekz. *departement-o*, *disciplin-o*), sed ankaŭ per OA 3 (ekz. *civilicaci-o*, *ĉifr-o*), OA 4 ĝis OA 7, OA 8 (ekz. *Afrik-o*, *Azi-o*) kaj OA 9 (ekz. *ĉirkumcid-i*). En tiuj Aldonoj tamen mankas simila persteleta referenco al ĝi kiel ĝi ekzistas en OA 1. Kelkaj vortoj notitaj ĉe WACKRILL fine mankas en la Fundamento eĉ laŭ stato de 2007 (OA 9), kvankam ili meritas esti aldonitaj (ekz. *anso*, *beduen-o*, *Cezar-o*).

La vortoj estas ĉerpitaj el la Zamenhofaj tradukoj de *Hamleto* (Ŝekspiro - Ham), *La Rabistoj* (Ŝillero - Rab) kaj *La Revizoro* (Gogol - Rev), krome el la pluraŭtora *Fundamenta Krestomatia* (FK) kaj kelkaj pliaj fontoj. La antaŭparolo nur malprecize indikas la bibliografiajn informojn, tiel ke ne fariĝas klare, ĉu ekz. bazo de *Hamleto* estas la originala unua eldono de 1894 aŭ la fare de DE BEAUFONT iom ŝanĝita dua aŭ tria, aperintaj ĉe Hachette ĉ. 1902 kaj ĉ. 1904.<sup>1</sup> Pluraj notoj montras, ke la kunlaborintoj uzis kaj la unuan eldonon de la Fundamenta Krestomatia de 1903 kaj la de Zamenhof mem iom reviziitan kvinan de 1907 (ekz. 1-a eld. *meskit-o*, 5-a *moske-o*). Ni klopodis spuri la uzatajn eldonojn en la apudmetita listo.

Post ĉ. 100 jaroj kelkaj malmultaj citaĵoj impresas strangaj aŭ eĉ diskriminaciaj kaj ne plu akcepteblaj.<sup>2</sup> Kelkaj aliaj estas lingve arkaaj.<sup>3</sup> La leganto bv. konscii, ke temas pri historiaj tekstoj.

---

<sup>1</sup> Vd. la komparon de Gaston WARINGHIEN. Kritika ‚aparato‘ de la Zamenhofa Hamleto. En: *Lingva Kritiko* 1933:1:21 (Dec.), p. [2-3], repr. Bad Bellingen: Iltis 2016.

<sup>2</sup> Ekz. ‚la *rasoj* pli malaltaj, kiel ekzemple negroj‘; ‚polip‘ – duone besto duone kreskaĵo‘; La nomo *hotentot* por la etno de la *kojoj* aŭ *kojkojoj* vivanta en Sudafriko kaj Namibio nuntempe estas rigardata rasisma kaj diskriminacia k.t.p.

Enhave iuj vortoj mankas (ekz. *dan'* en Ham [titolpaĝo]: reĝido de *Danujo*; *norveg'* en Ham 0 [Personoj]: reĝido de *Norvegujo* k.a.), dum kelkaj aliaj estas troaj, ĉar ili jam troviĝis en UV laŭ stato de 1905. La originalo intence kaj nur escepte notas personajn kaj geografiajn nomojn (vd. la antaŭparolon de WACKRILL). Tiel ĝi ja notas *jezuit'* el FK (OA 1), sed ne *Jesu'* el la pli posta Rab (OA 3.2) – miso, kiu kaŭzis duoblajn formojn kaj dubojn ĝis al nia epoko (detalojn vd. en BK II.2). Ni kolektis mankantajn proprajn nomojn en listo je la fino de la verketo.

En 1908 ekzistis jam du similaj, pli fruaj konkordancoj:

- Vortoj ĉerpitaj el „Hamleto“. Paris: Lingva Komitato. 1906, 4 p.
- WACKRILL, Alfred E. Konkordanco de „Ekzercaro“ de dro L.L. Zamenhof. Paris: Hachette 1907, 95 p.<sup>4</sup>

La plej gravaj postaj konkordancoj estas

- WÜSTER, Eugen. Zamenhof-Radikaro. Leipzig 1927, 84 p.
- RIHEJ Nomura. Zamenhofa Ekzemplaro. Nagoya-si 1989, xxi, 512 p.

Formale La originalo de 1908 estas tre zorge verkita. Ni skanis ĝin kaj senkomente ĝustigis la nuran manplendon da evidentaj preseraroj. Kelkajn malmultajn vortarajn artikolojn ni prikomentis en pintaj krampoj ({..}) aŭ piednotoj, la angulaj krampoj ([..]) estas tiuj de la originalo. Malgraŭ plurfoja kontrollegado povas esti, ke ankoraŭ troveblas skan-eraroj, ĉefe ĉe similformaj literoj kiel la minusklaj *t*, *l* kaj *i* k.a. Atentigojn pri tiaj kaj ĉiuj aliaj misoj oni bv. sendi al la adreso indikita en la kolofono.

Berlino, en Aprilo 2017

Bernhard Pabst

---

<sup>3</sup> Ekz. la duobla formo *miliard'* (OA 1) / *miljard'* (ark.) trovebla en FK; anstataŭ *katakumb'* de OA 2 estas *katakomb'* (-o- anstataŭ -u-); anstataŭ *ĥin'* la Fundamenta formo de OA 9 (2007) estas *ĉin'*; anstataŭ *postesignoj* la vorto *spuroj* nuntempe estas pli kutima k.t.p.

<sup>4</sup> La verko estas konsultebla en la reteprezento de la Kolekto pri Planlingvoj, Vieno, je la adreso <http://data.onb.ac.at/rec/AC04213266>.



## La Referencverkoj

---

Ni notas tie ĉi nur la eldonojn, aperintajn antaŭ Julio 1908, do tiujn, kiujn la aŭtoroj povis uzi. Pri *FK* la konkordanco mem klarigas, ke oni uzis kaj la 1an kaj la de Zamenhof mem rev. 5a eld. Koncerne al *Hamleto* ni supozas, ke bazo estis unu(j) el la rev. eld. 2a ĝis 4a. Ĉe la *Ekzeraro* la demando ne gravas, ĉar la revizio koncernas nur naciajn tradukojn, sed la esperanta teksto restis la sama.<sup>5</sup> Ĉe la *Rabistoj* kaj la *Revizoro* temas pri la unuaj libroformaj eldonoj (ili antaŭe ambaŭ felietone aperis en „La Revuo“). Ni provizore rezignis malŝlosi la svagan indikon „el unu Zamenhofa letero“.

- Ekz Fundamenta Ekzercaro. Zamenhof, L.L. Varsovio. 1a 1894, 2a rev. 1898
- FK Fundamenta Krestomatio. Zamenhof, L.L. (red.). Paris: Hachette 1a 1903, 5a rev. 1907.
- Ham Hamleto. Ŝekspir, V. Zamenhof, L.L. (trad.). Nurnbergo: Tümmel 1a 1894. — Shakespeare, W. Paris: Hachette 2a rev. ĉ. 1902, 3a < 1904, 4a 1906.
- Rab La Rabistoj. Schiller, Frederiko. Zamenhof, L.L. (trad.). Paris: Hachette 1908.
- Rev La Revizoro. Gogol, N.V. Zamenhof, L.L. (trad.). Paris: Hachette. ĉ. 1907.

---

<sup>5</sup> Detalojn vd. en BK I, estontece en BK III – Zamenhofa Verkaro.



## Antaŭparolo

---

Tiu ĉi vortareto konsistas el citatoj el kelkaj verkoj de D<sup>ro</sup> Zamenhof, kaj montras la uzadon de pli ol 800 vortoj, kiuj ne havas lokon en la « Universala Vortaro ». Ĝi celas prezenti bazon kaj modelon por eble estonta pli plena vortaro de Zamenhofaj vortoj. La nuna verketo estas rezultato de la laboroj de la « Zamenhofa Subkomitato » aranĝita de la « Lingva Komitato » en la Kongreso en Cambridge en aŭgusto 1907. La verkoj ĝis nun esploritaj estas: la EKZERCARO, HAMLETO, FUNDAMENTA KRESTOMATIO, LA REVIZORO kaj LA RABISTOJ. La referencoj, aŭ lokaj citaĵoj, estas donitaj por Ekzercaro laŭ la sekciaj kaj frazaj numeroj troviĝantaj en la « Konkordanco de Ekzercaro »; ĉe ĉiuj aliaj verkoj la referencoj estas donitaj laŭ paĝaj kaj liniaj numeroj. Ĉe La Revizoro kaj La Rabistoj, la numeroj rilatas ne al la paĝoj de « La Revuo », kie tiuj verkoj unue aperis, sed al la apartaj volumoj eldonitaj de la firmo Hachette.

Kiam en la verko la presitaĵo estas interrompita (ekzemple, ĉe komenciĝo de nova ĉapitro aŭ en drama dialogo) tiam la linia numero estas donita ne laŭ efektiva kalkulado sed laŭ la loko, kiun okupus la dirita vorto sur la paĝo, seninterrompe presita. Ekzemple, ĉe la vorto « Poezio », kiu troviĝas en *Fundamenta Krestomatio* kiel titolo sur paĝo 317, la donita referenco estas: FK 317,9, ĉar la dirita vorto okupas la lokon de la naŭa linio de plene presita paĝo, kiel 312,375 k. t. p.

La citaĵoj notitaj per litero K {en la reldono per: FK} montras la *Fundamentan Krestomation*, ne distingante en ĝi la verkojn propre Zamenhofajn de la ceteraj. Oni do invitas la leganton atente relegi en tiu libro la antaŭparolon de la Majstro kaj tiri el ĝi siajn konkludojn pri la grado de aŭtoritateco de la ne-Zamenhofaj verkoj, kiuj troviĝas en la *Krestomatio*. [6]

Personaj kaj geografiaj nomoj estas enmetitaj nur en okazo se ili havas ĝeneralan intereson, krom la persona kaj geografia.<sup>6</sup>

Steleto post ia vorto (ekzemple: **akr'** \*, **bor'** \*, k. t. p.)<sup>7</sup> montras, ke samforma radikoj kun malsama signifo troviĝas en la *Universala Vortaro*.

---

<sup>6</sup> [pb]: Ekz. *Afriko*, *Azio*, *Julia* aŭ *Gregoria* kalendaro, *herkulesa* laboro k.t.p. Vd. nun la kompletan liston je la fino de la verketo.

<sup>7</sup> [pb]: UV – *akr'a* (tranĉilo) kontraste al *akr'o* (angla termezuro); UV – *bor'i* (truon) kontraste al *bor'o* (kemia gaso). UV – *Juli'* (nomo de monato) kontraste al *Juli'* (vira persona nomo, ekz. de Julio Cezaro). Temas pri homonimoj.

Rektangulaj krampoj, [ ], montras rimarkojn de la redaktoro, kiuj nur tiom valoras, kiom ili trafas la konsenton de la leganto. Tri punktoj (...) signas ian foreston de unu aŭ kelkaj vortoj.

24-an de junio 1908.

ALFRED E. WACKRILL (el Londono),  
Redaktoro por la Subkomitato.

Nomaro de la Subkomitato por Zamenhofaj verkoj :

AHLBERG, DOR, JUNCK (S<sup>INO</sup>), MILLIDGE,  
MYBS, SCHAFFER (F<sup>INO</sup>), SIMON, WACKRILL.

# Zamenhofaj Vortoj

## Netroveblaj en la Universala Vortaro

Tiritaj el

*Ekzercaro, Hamleto, Fundamenta Krestomatio, la Revizoro*

kaj *la Rabistoj*, kun Citaĵoj

---

### A

- abism'** Rab 84,17 : la esperojn de mia vivo mi devis vidi forfali en la *abismon*.
- ablativ'** FK 254,23 : la *ablativo* [estas esprimata] per per aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco.
- abort'** Rab 65,15 : gravedaj virinoj, kiuj timis *aborti*.
- abrupt'** Rev 48,32 : per rapida *abrupta* voĉo. — Rev 64,30 : Subite kaj *abrupte*.
- absolut'** Ham 46,34 : junuloj ofte tro suferas je *absoluta* manko de singardo. — FK 244,23 : alportinte *absolute* nenian utilon. — FK 269,30 : ili *absolute* ne volas kredi.
- absorb'** FK 160,2 : mi sidis tiel *absorbite* per la notoj, ke mi ne rimarkis vian eniron.
- abstrakt'** FK 284,2 : batalado *abstrakta* kaj teoria. — FK 264,19 : signoj figuraj ... permesas la prezentadon de *abstraktaĵo*.
- absurd'** Rev 41,11 : *Absurdo*, plena *absurdo* ! — FK 300,14 : ĝi faros tamen tian *absurdan* elekton. — FK 311,17 : vortoj ... kiujn ne uzi estus rekta *absurdo*.
- aĉ'** Rab 129,31 : *Pastraĉa* babilado !
- adept'** FK 244,10 : la afero, kiu povus alporti utilon al ĉiu aparta *adepto* nur tiam, se antaŭe jam ekzistus multego da aliaj *adeptoj* ... — FK 286,5 : la nombro da *adeptoj* de tiu ĉi lingvo kreskadus.
- adjutant'** Rev 83,24 : kurieroj kaj *adjutantoj* ĉiam rapidas antaŭe. — FK 61,33 : la alkurinta *adjutanto*.
- admiral'** Rev 66,8 : diversaj eminentuloj, senatanoj kaj *admiraloj*. — FK 92,29 : la *admiralo* ne kuŝigas sin. — FK 92,24 [ŝipo, kiu] portas *admiralan* flagon sur la masto.
- adopt'** FK 173,8 : Ĉu vi ne volus fariĝi mia *adopta* filino?
- adres'** Ekz 42,8 : El la tri leteroj, unu estis *adresita* al ... — FK 227,29 : mi permesas al mi *adresi* al vi mian prezaron.

- adstring'** FK 233,30 : En la ceteraj okazoj sufiĉas *adstringaj* gutoj (okulakvoj). — FK 234,5 : *adstringantaĵoj*.
- advokat'** FK 61,14 : Unu *advokato*, tre malgranda, venis juĝejon. — FK 247,21 : [ekzemplo de internacia vorto].
- aforism'** Ham 86,31 : Ĉu tio ĉi estas prologo aŭ ia *aforismo* ?
- Afrik'** FK 200,1 : diamanto-grandegulo, kiun oni antaŭ nelonge trovis en la suda *Afriko*.
- agat'** Rab 71,10 : Tiun ĉi *agaton* mi portas pro la honoro.
- agit'** [El unu Zamenhofa artikolo] : Li [L. Einstein] havis la intencon komenci vastan sisteman *agitadon*.
- agoni'** Rab 47,20 : mia mortanta kamarado ... diris *agoniante*. — FK 190,5 : kriado kaj *agonio* de la mortantaj bestoj.
- agronomi'** FK 207,26 : oni malfermis lernejon de *agronomio*.
- akademi'** FK 309,33 : la estonta *akademio* aŭ kongreso. — FK 207,17 : *akademion* de la greka kaj latina lingvoj.
- akord'** Rab 37,23 : la humora stato de la spirito *akordiĝas* kun la movoj de la materio. — Rab 37,24 : *malakordo* de la meĥanikaj vibracioj. — FK 392,4 : Se 1' harpo eĉ estas rompita – 1' *akordo* ankoraŭ do ploras.
- akr'\*** [*acre*, angla mezuro por tero] FK 205,33 : Chautauque okupis 150 *akrojn* da bela tero.
- akt'** FK 198,22 : la kiso havis sian komencon en la *akto* patrina. — Ham 1 (titolo), *Akto* I. — FK 71,15 : la preparaj *aktoj* [en la juĝejo].
- aktiv'** Ekz 29,8 : se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas *aktiva*) aŭ ne. — FK 255,10 : *aktiva* estanta [akceptas la finiĝon] *-ant*; aktiva estinta *-int*.
- aktor'** Ham 64,13 : La plej bonaj *aktoroj* en la mondo, por tragedioj.
- akurat'** Ham 1,33 : Vi *akurate* venis al la servo! — FK 80,8 : Mi amas, ke oni *akurate* pagu la luan pagon. — Rab 109,1 : li promesis reveni al ni *akurate* je la oka horo.
- akvilegi'** Ham 130,24 : Jen estas fenkolo por vi kaj *akvilegio*.
- alarm'** Rab 132,12 : la tuta vilaĝo estas *alarmita*. — Rab 62,29 : la *brulalarmaj* sonoriloj komencas brui.
- album'** Rev 74,26 : Mi petas vin, ke vi skribu al mi pro memoro iajn versojn en la *albumon*.
- ale'** FK 108,31 : ni estis sur la strato kaj paŝis rapide tra unu el niaj larĝaj *aleoj*.
- alegori'** Rev 51,13 : li ... ŝprucigis tiajn *alegoriojn* kaj kaŝitajn sen-

- cojn, ke ŝajnis, ke oni neniam divenos la veron.
- alfabet'** FK 72,10 : por la plimulto de la kulturaj popoloj estis enkondukita jam longe ... unu kondiĉa *alfabeto*. — FK 212,7 : en returnita ordo de la *alfabeto*. — FK 291,15 : konatiĝo kun ĝia plej simpla *alfabeto*.
- algebr'** FK 259,1 : similaj je la signoj de la *algebro*.
- alhemi'** FK 183,24 : la *alhemiisto* Villeneuve anoncis, ke en la jaro 1335 venos la Antikristo.
- aligator'** FK 199,23 : la loko de loĝado de *aligatoroj* kaj aliaj akvaj bestoj.
- alkohol'** FK 195,2 : la plejparto de la centjaruloj tute ne uzadis *alkoholon*. — FK 232,16 : troa ĝuado de *alkoholaj* trinkaĵoj. — FK 115,3 : De la tago de mia edziĝo mi uzis nenian *alkohol-aĵon*.
- almanak'** Rab 25,1 : ian poŝlibron, aŭ *almanakon*, aŭ ion similan.
- altan'** FK 323,25 : al ĝardeno *altano* ili ambaŭ sen bru' alŝteliĝas.
- ambasador'** Rev 47,27 : ministro de la Aferoj Eksterlandaj, la franca *ambasadoro*, la *ambasadoroj* angla kaj germana kaj mi. — FK 143,22 : eniris la belega edzino de la *ambasadoro* N.
- ambrozi'** FK 456,11 : l' *ambroziaj* bulkharoj de l' potenculo subfalas. — Rab 33,21 : lasu vin mortigi per la *ambroziaj* odoroj, kiuj vaporas el lia faŭko.
- Amerik'** FK 270,7 : legu la historion de la eltrovo de *Ameriko*.
- amfor'** FK 354,15 : peza la *amforo* konsolas.
- amoni'** FK 234,20 : Rp. *amonio* klora 0,5.
- analiz'** Rab 114,20 : *analizadi* la konfuzitan bildon. — FK 243,15 : Mi ne *analizos* tie ĉi la diversajn provojn.
- anatom'i'** Rab 62,5 : mi estis jam kun mia haŭto kaj haroj forvendita al la *anatomio*. — FK 207,29 : fakultaton por *anatomio*.
- anekdot'** FK 69,34 : El la *anekdotoj*, kiuj rakontas pri Henriko VIII.
- anonim'** FK 268,18 : Raporto verkita de *anonima* aŭtoro. — FK 134,11 : iu mia bondeziranto sciigis min per *anonima* letero.
- ans'** Rev 29,10 : Ĉe la pordo ekmoviĝas la *anso*.
- Antikrist'** FK 183,25 : Villeneuve anoncis, ke en la jaro 1335 venos la *Antikristo*.
- antipati'** FK 279,2 : siaj simpatioj kaj *antipatioj*.
- antipod'** FK 280,1 : nacio tute fremda kaj eĉ *antipoda* por ĝi. — FK 100,33 : instruo pri la *antipodoj* estas nekonforma al la principoj de la religio.

- antropologi'** FK 207,28 : oni malfermis *antropologian* fakultaton.
- aparato'** FK 193,34 : nova *aparato*, kiu kvietigas la ondegojn.
- apati'** FK 284,27 : ni kun malespero kaj *apatio* lasus fali la manojn.
- apelaci'** Rab 30,4 : La homoj kaŝis antaŭ mi homecon, kiam mi *apelaciis* al homeco.
- apetit'** Ham 53,23 : li perdis la *apetiton*. — Ham 124,13 : Bonan *apetiton* ! — Rev 76,16 : kaj ŝi ankaŭ estas tre *apetita*.
- aplomb'** FK 272,27 : kriante kun la *aplombo* de instruitulo. — FK 279,23 : homoj, kiuj kun scienca *aplombo* kredigas.
- apostrofo'** FK 256,4 : la fina vokalo ... povas esti ... anstataŭata per *apostrofo*.
- arab'** FK 68,29 : li kaj lia servanto kurigis 50 sovaĝajn *arabojn*. — FK 30,26 : *araba* legendo.
- ard'** Rab 114,7 : kial mia Perillo faris el mi bovon, en kies *ardanta* ventro la homeco rostiĝas. — Rab 63,30 : kiam oni el *ardanta* forno saltas en glacian akvon.
- arĥeolog'** FK 199,31 : La *arĥeologoj* promesas al si riĉan rikolton.
- arĥi-** Rev 84,24 : *Arĥifriponoj*, protokanajloj, maraj trompisto!
- aristokrat'** Rev 84,1 : viaj konatoj estos homoj kun la plej *aristokrata* konduto. — FK 128,5 : Mia patro estis tre riĉa homo, natura *aristokrato*.
- aritmetik'** FK 80,34 : Nu, ĉu vi lernis *aritmetikon*?
- Arkad'ujo** FK 124,15 : al la rando de la mondo, al plej feliĉa *Arkadujo*.
- arme'** Rab 74,27 : Mi sentas *armeon* en mia pugno.
- arog'** Rev 78,29 : mi ne *arogas* al mi kredi. — Rab 85,23 : Vi *arogas* al vi esperi, ke vi kaptos viron per flatoj. — Rab 66,9 : kiu *arogis* ludi kun la bastonego de Jupitero.
- arom'** FK 163,7 : ni ambaŭ enspiradis per plenaj pulmoj la *aromon* de romaneco. — FK 28,15 : blankaj, delikataj, *aromaj* lilioj.
- arŝin'** Rev 70,2 : la peco ja enhavas ĉirkaŭ kvindek *arŝinoj*. — Rev 84,24 : kio, samovaristoj, *arŝinistoj*, plendi vi ekvolis?
- asesor'** Rev 8,3 : via *asesoro*. Li sendube estas homo instruita. — Rev 45,28 : Oni volis eĉ fari min kolegia *asesoro*.
- aspir'** Rab 41,24 : tiele staras la afero de via *aspirado* pri la fraŭlino.
- astigmatism'** FK 232,34 : personoj *astigmatismaj*.
- astr'** Rab 108,5 : Luno estas nia *astro*.
- astrolog'** FK 183,21 : la *astrologoj* ektimigis la popolojn per antaŭdiro, ke baldaŭ fariĝos kuniĝo de ĉiuj planedoj.



**astronom'** FK 184,35 : la glora franca *astronomo* Kamilo Flammarion. — FK 193,8 : La Amerika *astronomo* Jonson.

**ateist'** Rab 25,6 : kaj se tio ĉi ne bone iros, tiam fariĝi *ateisto!*

**Atlant'** FK 205,29 : *Atlanta* Oceano.

**atlas'** FK 154,7 : La meblaj kovriloj estis el blua *atlaso*.

**atlet'** FK 199,16 : La « feliĉa elektito » fariĝis unu *atleto*, kiu ne havis sukceson en la cirkoj.

**atmosfer'** FK 184,31 : la ĥemia kuniĝo de la densigita vosto de la kometo kun la oksigeno de nia *atmosfera*.

**aŭdienc'** Rab 99,22 : ĉe mi ĝi neniam ricevos *aŭdiencon*. — FK 103,26 : Ili petas *aŭdiencon* ĉe la reĝino. — FK 99,29 : Mendoza aranĝis por li *aŭdiencon*.

**aŭkci'** Rab 40,6 : Li konsilis al vi, ke vi vendu per *aŭkcio* vian dokumenton de nobeleco. — Rab 16,22 : matraco, kiun ĉe *aŭkcio* iu forŝiris de ili per plidono.

**Aŭstrali'** FK 197,27 : *Aŭstraliaj* elmigrantoj.

**aŭtomat'** FK 131,26 : Ŝi *aŭtomate* sin apogis sur la brakon de Arturo.

**aŭtor'** Ham 66,5: [iu drama peco] havas ... nenian esprimon, kiu montras ĉe la *aŭtoro* la intencon de arta ornamado. — FK 273,20 : tiuj ĉi artikoloj estas ankoraŭ sen-

kuraĝaj, kvazaŭ la *aŭtoroj* timas, ke ...

**aŭtoritat'** Ham 66,1 : laŭ la opinio de aliaj personoj, kies juĝo en tiaj aferoj estas pli *aŭtoritata* ol mia. — Ham 113,25 : teruran lian agon per ĉiuj artoj kaj *aŭtoritato* ni penos senkulpiĝi.

**Azi'** FK 206,22 : Eŭropon, *Azion* kaj Afrikon. — FK 217,7 : parto de la poŝto *Azia* kaj Aŭstralia.

**azimut'** FK 236,31 : oni nomu *a* la *azimuton* de la suno.

## B

**Babel'** Rev 56, 21 : vi ankaŭ pri la turo de *Babelo* bonege parolas.

**babilon'** FK 266,21 : la *babilona* konfuzo de lingvoj.

**bac'** [Okaza vorto. La germana *Batzen* = kvar krejceroj] Rab 18,23: la prezo falis ĝis tri *bacoj*.

**bacil'** FK 65, 27 : la *baciloj* de tiu ĉi malsano portas sin en la radioj de la suno.

**bal'** FK 47,17 : Hodiaŭ vespere ni havos *balon* de kortego. — Rev 47,18 : Mi ja ankaŭ *balojn* donas.

**balast'** FK 274,16 : ni tie ĉi forlasos ĉian superfluan *balaston*. — FK 290,27 : superfluan kaj tute al nenio servantan *balaston*.

**balkon'** FK 15,17 : sub la belega marmora *balkono*.

- balzam'** Rab 90,19 : kia *balzama* dolĉeco iras el vi. — Rab 33,20 : Iru, enkaptu lian *balzaman* spiron.
- banderol'** FK 217,23 : gazetoj estas sendataj sub *banderolo* ... papera strio kun la adreso.
- bandit'** Rab 86,4 : Por venkoj de *banditoj* ne ekzistas triumfoj.
- bank'** FK 112,21 : ni havas ankoraŭ jam ion en la ŝpara *banko*. — FK 111,34 : li metis ... dudolaran *banknoton* en mian manon.
- bankier'** FK 194,29 : la redakcio faras multajn servojn privatajn, divenante ekzemple ... al *bankieroj* pri aliaj kontoranoj.
- bankrot'** Rab 94,11 : la senlima indulgo devus *bankroti*, se ĝi volus pardoni ĉiujn miajn kulpojn. — Rab 13,28 : kambio, per kiu eĉ *bankrotulo* en ekstrema okazo al si helpas.
- barak'** Rab 65,21 : kiam mi preteriris antaŭ unu el tiaj *barakoj*.
- barbar'** Rab 143,11 : vi malbonavidaj servistoj de miaj *barbaraj* ordonoj. — Rab 32,9 : *Barbarege*, kruele ! Tiun ĉi amon tiel rekompenci.
- barbiton'** FK 354,13 : flut', liutoj, *barbitonoj*.
- bard'** FK 365,32 : Dum kun kantoj novaj *bardoj* paŝos jam sur nia tero.
- barel'** FK 116,33 : Jen estas *barel-eto* da tritiko. — Rab 63,29 : Ĝi estis krako, kvazaŭ ĉe la *ĉielbarel-eto* krevis ringeoj.
- bariton'** FK 179,20 : la nunaj iliaj posteuloj estas *baritonoj*, iliaj nepoj posedos voĉon basan.
- barometr'** Rab 52,30 : mia frunto estos via *barometro*.
- baron'** FK 69,81 : via *barona* moŝto. — Rev 46,29 : Ĉion, kio estas sub la nomo de *barono* Brambeus ... mi verkis.
- bas'** FK 179,21 : iliaj nepoj posedos voĉon *basan*. — FK 179,25 : tiel ekzemple tenoro ... povas ... fariĝi ... *baso*. — FK 179,34 : *basuloj* povas ilin ĝui, kiom ili volas.
- basen'** FK 45,12 : plej belaj kreskaĵoj, kiuj sin trovis en la granda *baseno*.
- bastard'** FK 323,24 : silente min sekvu, *bastardo* ! {Rab [4, Personoj] : Hermano, *bastardo* de nobelo}.
- baz'** Rab 14,29 : Ĉu mi povas nomi amo tion, kio ne estas *bazita* sur estimo al mia « mi » ?
- bazilisk'** Rab 77,12 : por ĉiam liberigita de via *baziliska* rigardo.
- beduen'** FK 31,10 : legendoj, kiujn la *beduenoj* kantas apud la « Puto de Beno ».
- bengal'** FK 184, 32 : eksplodis bel-ega *bengala* fajro.
- bibli'** Ham 144,27 : Ĉu vi havas nenian ideon pri la *Biblio*? En la *Biblio* estas ja dirite : ĉiuj nobeluloj devenis de Adamo. — FK

- 78,20 : laŭ la rakonto de la *biblio* la religiaj kondukantoj vivis malriĉe kaj simple.
- bibliotek'** FK 204,27 : aliaj pruntas la necesajn librojn el *bibliotekoj*. — FK 88,29 : *bibliotekisto* ne povis doni la naŭan volumon.
- bigot'** Rab 57,12 : tiel facila, kiel la salto de publikulino al *bigotulino*. — Rab 60,16 : [la urbo] estas tiel abomene *bigota*.
- bild'** Rab 126,19 : viva *bildo* de la lasta juĝo. — Rab 114,26 : analizadi la konfuzitan *bildon* de la universala mizero. — Rab 53,31 : mi diktas ... la vivan *bildon* de unu tiea doktoro.
- biologi'** FK 203,32 : Facilaj lecionoj de *biologio* de la bestoj.
- blasfem'** Rab 33,17 : Senhonta *blasfemisto* !
- blefarit'** FK 231,23 : la brulumo de la palpebra rando - *blefarito*.
- blefarofimoz'** FK 232,5 : tiam naskiĝas *blefarofimozo*.
- blenore'** FK 233,7 : *blenoreo* de la larma sako.
- bombard'** Rab 18,15 : ili krias, ke ili *bombardos* la urbon.
- (bon-tono)** [okaza vorto {laŭ la franca *bon tone*}] Rev 69,20 : Nur en la ĉefurbo ekzistas ja *bon-tono*. [Vidu ankaŭ movetono].
- bor'** \* FK 234,4 : *bora* acido kaj aliaj adstringantaĵoj.
- bordel'** Rab 56,15 : vi ennestiĝas en kafejoj, *bordeloj*, drinkejoj.
- bosk'** Rab 23,30 : Sufiĉe da kuraĝo, por *boski* sub minacanta pendo kun la diablo mem.
- botanik'** FK 247,20 : [ekzemplo de internacia vorto].
- bracelet'** FK 143,27 : sur ŝiaj brakoj ... brilis *braceletoj*.
- braman'** FK 34,16 : saĝa, sed malriĉa *bramano*. — FK 34,27 : la *bramano* venis kaj faris ĉion, kion faras la aliaj magiistoj.
- breĉ'** Rab 143,22 : forakrigi la *breĉetojn* de via glavo.
- brokant'** Rab 13,26 : grandvalora monero, per kiu oni povas majstre *brokanti*. — Rab 17,28 : La tuta popolo *brokantu* per malnovaj pasamentoj kaj bukoj.
- brom'** FK 182,7 : en tre granda amaso sorbigitaj de *bromo*.
- broŝur'** FK 204,12 : la sekretario sendas multon da *broŝuroj* kaj dokumentoj. — FK 241,18 : La nun proponatan *broŝuron* la leganto kredeble prenos en la manojn.
- buddist'** FK 191,13 : la pli altaj kastoĵoj de la hindoj-*buddistoj*.
- buduar'** FK 154,6 : Estis tre agrable en la *buduareto* de sinjorino Breine.
- bull'** FK 186,30 : La papoj ... eldonis *bullojn* malpermesantajn la fumadon.

**bulvard'** Rev 22,21 : li promenadas sur la *bulvaroj*.

**burk'** FK 361,13 : sub la *burko* objekto tre granda. « Filo, sub la mantelo rusa mon' en sitelo? »

## C

**centim'** Ekz 41,15 : *Centimo*, pfenigo kaj kopeko estas moneroj.

**centimetr'** FK 200,7 : ŝtonon havantan la alton de ĉirkaŭ 8 *centimetroj*.

**centr'** Ham 57,32 : en la regiono de ŝia zono aŭ en la *centro* de ŝia favoro. — FK 239,25 : la sfero ĉiela havanta *I* kiel *centron*. — FK 184,24 : ŝanĝo de la *centro* de pezo de la tero.

**ceremoni'** Ham 131,35 : sen *ceremonioj* kaj sen funebraj formoj kaj parado. — Ham 164,32 : Li faris *ceremoniojn* kun la mammo de sia patrino antaŭ ol suĉi ĝin. — FK 23,19 : *ceremoniestro*.

**cezar'** Rab 112,27 : Ĉu la granda urb' ankoraŭ staras ... dum en ĝi neniu nun *cezaras*?

**cigan'** [R *cüigan* ; I *zingari*; F *tzingari*; G *Zigeuner*] FK 63,33 : *Ciganoj* entute estas grandaj amantoj de porka sebo.

**cilindr'** FK 225,6 : Tiuj ĉi iroj estas tute *cilindraj*. — FK 227,9 : iliaj trakondukoj prezentus belegan *cilindron* kun diametro de cent metroj.

**cirk'** FK 199,17 : atleto, kiu ne havis sukceson en la *cirkoj*.

**cirkumcid'** Rab 17,19 : mi per stranga okazo estas jam antaŭe *cirkumcidita*.

**civil'** Rev 14,14 : juna homo ... en *civilaj* vestoj.

**civilizaci'** FK 277,11 : La tutan nian altan kulturon kaj *civilizacion* ni dankas nur al unu objekto. — FK 199,7 : en la tempo de pli granda disvolviĝo de la *civilizacio*.

## Ĉ

**ĉial'** {legu: ĉial} Ekz 30,5.

**ĉies'** {legu: ĉies} Ekz 30,5.

**ĉifr'** FK 267,16-21 : Sistemo *ĉifrada* kaj telegrafada ... *ĉifraj* telegramoj.

**ĉiom'** {legu: ĉiom} Ekz 30,5.

## D

**definitiv'** [El unu Zamenhofa letero] : ripeti tiun inviton, eble kun peto pri *definitiva* respondo.

**dekan'** FK 73,19 : Mia sinjoro ... petas vin, sinjoro *Dekano*, akceptu tiun ĉi malgrandan donacon.

**deklam'** Ham 65,31 : Mi aŭdis, kiel vi unu fojon *deklamis* parolon. — Rab 109,20 : ni multe *deklamas* pri sendependeco. — Rev 49,6:

- mi estas kontenta. (*Deklamante*)  
Laberdano ! Laberdano !
- deklar'** Rab 76,29 : *deklaras* sin propravole sklavo de Amalio.
- deklaraci'** Rev 76,23 : Se mi ne eraras, vi faras *deklaracion* pri mia filino?
- deklin'** Ham 34,6 : De mi, kies la amo estis sankta, *sendekliniĝa* ĉiam de la ĵuro farita en la tago de l' edziĝo. — FK 236,13 : la interspaco estas funkcio de la *dekliniĝo* de la suno. — FK 104,36 : *dekliniĝo* de la magneta montrilo.
- dekolt'** FK 155,4 : Ŝia tre *dekoltita* vesto.
- departement'** Rev 45,25 : Mi nur por du minutoj eniras la *departementon*. — FK 180,2 : la *departementoj* nordaj [de Francujo].
- depon'** Rev 65,4 : mono ... estas *deponita* en la oficejo de la komuna prizorgado.
- desert'** FK 89,80 : kiam oni alportis la *deserton*.
- despot'** FK 79,3 : *Despota* urbestro ofendis unu urbanon.
- despotism'** Rab 88,29 : kurbiĝi sub la jugon de la *despotismo*. { post la oficialigo de *-ist'* interpretinda kiel *despot'ism'* }.
- destin'** Rev 64,2 : Mi ne kuraĝas... forpreni tempon, *destinitan* por sanktaj devoj. — Rev 89,27 : Jen efektive, tiel *destinis* la sorto. — Rab 99,19 : la kota rondo de la homa *destino*.
- diadem'** Ham 68,15 : kun ĉifono sur la kapo, kie antaŭ nelonge sidis *diademo*.
- diafragm'** Ham 61,20 : la ridindulo elvokos ridon ĉe tiuj, kiuj [16] havus tikleblan *diafragmon*. — Rab 80,23 : ĝi tiklas vian *diafragmon* al rido.
- diagnoz'** FK 230,21 : el ili oni facile povas meti la *diagnozon*.
- dialekt'** FK v,21 : gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj *dialektoj*. — FK 192,2 : « patois » aŭ la simpla « *dialekto* de la ordinara vivo ».
- dialog'** FK 66,20 : inter ili komenciĝas la sekvanta *dialogo*.
- diametr'** FK 226,6 : kelkaj havas tridek centimetrojn en la *diametro*. — FK 196,28 : ĝi havis la alton de 90 metroj kaj ĉirkaŭ dek metrojn en la *diametro*.
- diet'** FK 116,22 : mi ekkonis ĝian pli grandan indon [t. e. de la manĝo kreskaĵa] en komparo kun la *dieto* miksita.
- diplom'** FK 206,20 : la somera kunveno servas por disdono de *diplomoj*.
- diplomat'** [vidu sub *diplomati'*].
- diplomati'** Ekz 32,3 : *Diplomatiiston* oni povas ankaŭ nomi diplomato.
- direkci'** Rev 46,20 : mi ne volis verki, sed la teatra *direkcio* diras : « Ni petas vin, amiko ».

**direktor'** FK 198,4 : La kolonio estas regata de *direktoro*. — Rab 48,5 : Strange, la *direktoro* [de departemento] forveturis. — FK 77,33 : La *direktoro* iras al la reĝisoro.

**disciplin'** Rev 48,24 : Mi al ili ĉiuj instruis *disciplinon*.

**disertaci'** FK 257,27 : en latina *disertacio* (Dissertatio de arte combinatoria).

**diskredit'** FK 316,3 [315,36 en la eldono de 1903] : faris ian falsan paŝon kaj ridindigis aŭ *diskreditigis* per tio ĉi vian tutan aferon. [*Diskredit'* ne povas esti kunmetita el *dis'* kaj *kredit'*, ĉar tio donus rekte malan sencon].

**dog'** Rab 18,7 : la sinjoroj de la kolegio forpafigis piedon al via dogo.

**dogm'** FK 459,20 : [5<sup>a</sup> eldono, 1907] kun *dogmoj* de blinda fervoro.

**doktor'** Rab 18,18 : vi venigas *doktorojn*, tutan kuracistan konsiligon. — Rab 65,8 : pacientoj, kiuj plore vokadas sian *doktoron*.

**dokument'** Ham 147,16 : aĉetaj *dokumentoj*. — Ham 147,22 : *dokumentoj* de transdono. — FK 204,12 : la sekretario sendas multon da broŝuroj kaj *dokumentoj*.

**dolar'** FK 199,10 : ili proponas 5000 *dolarojn*. — FK 111,34 : metis ... *dudolaran* banknoton en mian manon. [17]

**dominik'** Rab 70,28 : mi forbruligis kaj prirabis la *dominikan* preĝejon.

**doz'** FK 297,23 : ĉe plej malgranda *dozo* da honesteco kaj bona volo.

**dragon'** Rab 83,9 : Cent sesdek husaroj, naŭdek tri *dragonoj*.

**dram'** Ham 62,22 : Longan tempon nenia *dramo* donis eĉ iajn enspezojn. — Ham 86,13 : tiu ĉi pantomimo montras la enhavon de la *dramo*. — Rab 80,22 : Ĝi estas *dramo*, miaj fratoj, kiu eligas larmojn.

**droŝk'** Rev 35,21 : Kiel vi intencas, ĉu en via kaleŝo aŭ kune kun mi en *droŝko*? — FK 89,35 : alveturis *droŝko* en kiun sidiĝis ĉiuj kvar sinjoroj.

**duel'** Ham 42,26 : Jes ! drinkado, *duelado*, insultemeco, aŭ malpacemeco. — FK 83,36 : ricevinte ... elvokon al *duelo*, sendis al li sekundanton.

**dukat'** Ham 120,18 : Eĉ kvin *dukatojn* mi por ĝi ne donus.

## E

**ebri'** Rev 17,7-8 : oni alveturigis lin morte *ebrian* ... ĝis nun li ne *mal-ebriiĝis*. — Rev 43,24 : kiam en la urbo ... la *ebriuloj* estas malmute.

**Eden'** FK 154,20 : tiu ĉi malgranda *Edeno* de la sinjorino.

- efekt'** FK 309,8 : ili eĉ mem ne esperas doni ion pretan kaj taŭgan, sed ili volas nur fari *efekton*.
- efemer'** [El unu Zamenhofa artikolo] : vidante, ke la diversaj novaj proponataj sistemoj estas nur *efemeraj* ne pripensitaj provoj.
- egid'** FK 106,6 : Se en liaj manoj sin trovas la *egido* de Zeŭso.
- egipt'** FK 264,16 : la senmovaj *egiptaj* aŭ ĥinaj {de OA 9 (2007): ĉinaj} signoj figuraj. — FK 227,16 : la piramidoj de *Egiptujo*.
- egiptolog'** FK 266,25 : Pf. Lauth, la glora *egiptologo*.
- egoism'** FK 284,10 : Obeante la voĉon de la indiferenta *egoismo*.
- ehe!** Rev 44,3 : *Ehe*, mi scias, mia kara, kien vi celas!
- ej!** FK 150,10 {citaĵo mankas}.
- eklezi'** FK 299,27 : la tuta societo, la tuta ĉiopova *eklezio*, kaj eĉ la vivo mem. — Rab 128,9 : Treege bone, mia *ekleziulo!* — Rab 68,26 : Mi estas servanto de la *eklezio*.
- ekonomi'** Ham 16,34 : Afero simpla de *ekonomio* : de l' fest' funebra restis multaj manĝoj. — FK 246,19 : per tio ĉi mi enportis [18] grandegan *ekonomion* rilate la nombron de la vortoj ellernotaj. — Ham 21,8 : kial li ne dediĉis sin speciale al la politika *ekonomio*.
- ekscelenc'** Rev 156,9 : jen, via *Ekscelenco*, aŭ Princa Moŝto.
- eksces'** Rab 11,1 : kiuj en la fluado de liaj *ekscesoj* tiel senkompate maloportunigas al li la vojon.
- ekskomunik'** FK 186,27 : minaco de *ekskomuniko* kaj de la plej severaj punoj.
- ekskoriaci'** FK 230,13 : La konstanta malsekiĝado kondukas al la formiĝado de *ekskoriacioj*.
- ekskrement'** Rab 38,18 : remanĝasian propran *ekskrementon*. — Rab 67,14 : vi sufokiĝu en kloako, vi *ekskrementa* animo.
- ekspedici'** Rab 84,23 : mi partoprenis en *ekspedicio* al Hindujo. — FK 190,9 : supozante, ke la *ekspedicio* de Nansen havos sukceson.
- eksperiment'** FK 115,23 : ni kune legas kaj *eksperimentas*.
- ekspluat'** FK 247,21 : [Ekzemplo de internacia vorto].
- ekspres'** Rab 62,15 : Ni sendis al li *ekspreson*, kiu alportis al li skribeton. — Rev 92,8 : Jam mi estis vokinta la kurieron, por forsendi la leteron per *ekspreso*.
- ekstaz'** FK 28,31 : Tiuj ĉi okuloj ekbrulis per *ekstazo*. — Rab 140,17 : Rabisto Moor, en *ekstaza* feliĉego.
- ektropi'** FK 231,35 : kondukas al ĉiam plua malleviĝo de la mal-supra palpebro, al la *ektropio*.

- ekvator'** FK 185,12 : kiu iom post iom koncentriĝos en la regionoj *subekvatoraj*.
- ekzem'** FK 231,27 : atakata de *ekzemo*.
- elegant'** FK 68,10 : kaleŝo, en kiu sidas *elegante* vestita sinjorino. — FK 210,9 : granda salono, kiu estas aranĝita tiel same *elegante*, kiel la unua kaj dua kajutoj.
- elektr'** FK 140,23 : sur la antaŭaĵo de la lokomotivo estis distrata antaŭen *elektra* lumo.
- element'** FK 264,31 : esprimi ĉiujn vortojn laŭ iliaj *elementaj* ideoj. — FK 86,12 : alia montris la liberiĝon de kaŝita *varmelemento*.
- eliksir'** Rab 128,01 : mi gutigu por vi iom da *eliksiro* de vivo sur sukeron.
- elips'** FK 226,11 : ĝi prezentis la flankon de *elipsa* arko. — FK 238,18 : metitaj sur la *elipso*.
- Elize'** Rab 82,10 : Ho, vi ĉiuj *Elizeaj* scenoj de mia infaneco! Rab 90,20 : *Elizeo!* poezia mondo! [19]
- emulsi'** FK 230,11 : la larva fluidaĵo ... fariĝas speco de ŝaŭma *emulsio*.
- energi'** Ekz 37,7 : Nia urbo havas ... ne sufiĉe *energian* policestron. — FK 244,20 : sentante min nek pli talenta, nek pli *energia* ol ... — FK 300,25 : Ĝi postulas ... grandegan *energion*.
- Eon'** Rab 119,16 : de la tempo de la *Eonoj* neniu satano atingis ion similan.
- epidemi'** FK 271,7 : iu ĉiuhoma *epidemia* idioteco.
- epitet'** FK 199,3 : Ne ekzistas tie eĉ unu *epiteto*, kiu karakterizus la buŝon de Heleno.
- erik'** Rab 109,12 : kondukante nin tra la *erikejo*.
- erotik'** FK 199,5 : kiso *erotika*.
- eskadron'** Rev 56,1 : kial ni tie ĉi estas kvazaŭ tuta *eskadrono*? [Eble ne regula radiko, sed ŝerca kunmikso de *eskadr'* kaj *skadron'*].
- Esperant'** Ekz 22,10 : la lingvo « *Esperanto* ».
- esperantism'** FK 65,10 : Kio estas *esperantismo* ?
- esperantist'** [Internacia radiko por : Esperantano]. — FK 65,20 : Jes, respondis la kuracisto (kiu okaze mem estis *esperantisto*).
- estetik'** Ham 66,32 : tre bone deklamite : kun sento, kun *estetika* tono. — FK 303,5 : Esperanto estas plena je harmonio kaj *estetiko* kaj memorigas per si la lingvon italan.
- etaĝer'** FK 154,8 : Tie sin trovis ankaŭ multaj *etaĝeretoj*.
- etiologi'** FK 282,9 : *Etiologio*. La kaŭzoj de la kronika kataro ...



**Eŭrop'** FK 260,10 : ne tre facile povas elparoladi la *eŭropajn* konsonantojn.

**evangeli'** Rab 25,8 : tiam fariĝi ateisto! Mi povus bati la buŝojn al la kvar *evangeliistoj*.

**evident'** Rab 53,16 : mi havas *evidentan* benon de Dio. — FK 237,20 : la rilato ... *evidenta* per la fig. 2.

## F.

**fakt'** FK 286,10 : *fakto* jam plenumiĝinta. — FK 283,11 : tiu ĉi *fakto* entute iam venos. — Ham 13,19 : plej ordinara *fakto* en la mondo. — Ham 42,16 : nun vi povas lin kulpigi per plej diversaj elpensitaj *faktoj*.

**fakultat'** FK 207,17 : la universitato posedis jam 9 specialajn [20] *fakultatojn*. — FK 206,36 : *fakultaton*, konsistantan el profesoroj.

**fantazi'** Ham 141,34 : Ŝi tie plektis *fantaziajn* kronojn el plej diversaj floroj. — Rev 37,20 : Vi ĉiam havas iajn *fantaziojn*. — FK 271,29 : ŝajnas senenhava *fantazio*. — Rab 85,32 : ĝi flamigis vian infanan *fantazion*.

**faraon'** FK 353,30 : en la palac' de *faraono*. — Rab 71,16 : Ho *Faraono, Faraono!*

**farise'** Rab 71,31 : Ho, vi *fariseoj*, falsistoj de la vero.

**farmakope'** FK 234,19 : Laŭ la nova Aŭstruja *farmakopeo*.

**fat'** FK 107,14 : ĝis la fino de tiu ĉi batalo kun la lin persekutanta *fato*.

**fatal'** FK 175,5 : la edzino de mia amiko portas tiun ĉi *fatalan* ringon. — Rab 140,10 : mi kontraŭstaras al la tirano *fatalo*. — Rab 30,22 : Ne timu morton nek danĝeron, ĉar super ni reĝas neŝanĝebla *fatalo*.

**faŭn'** [zool.] FK 182,15 : esploroj pri la floro kaj *faŭno* de la Silenta Oceano.

**faŭn'** [mitol.] Ham 92,2 : La leono tamen mortis, kaj nun regas — ĝusta *faŭno*.

**feldmarŝal'** Rev 48,28 : oni donos al mi rangon de *feldmarŝ* ... {tiel}.

**felieton'** FK 269,4 : la unu renkontita *felietonisto* skribas pri ili « spritajn » artikolojn.

**fenik'** FK 264,7 : ni havas nian hereditan de la *feniko*-hebreoj fonetikan skribadon.

**fenomen'** FK 86,10 : ĉiu, por klarigi la *fenomenon*, elpensis sian teorion.

**feri'** FK 205,18 : la somera kunveno servas sole kaj propre por spirita ripozo, *ferioj*.

**feston'** FK 155,7 : faldoj kaj *festonoj* [en priskribo de sinjorina vesto].

**fi** Ekz 26,27 : *Fi*, kiel abomene! — Rab 110,21 : Jen! kaj tiel forram-

- pu via *fianimo*. — Rev 17,22 : *fikomercisto*.
- fiask'** FK 244,3 : tiuj ĉi provoj renkontis plenan *fiaskon*. — FK 315,31 : devis finiĝadi per la plej plena *fiasko*.
- fiks'** Rab 129,14 : mi *fikse* rigardos al vi en la okulojn.
- filantropi'** Rev 35,19 : ni rigardos la instituciojn *filantropiajn*.
- filozof'** Ham 89,26 : pli da aferoj, ol en la lernejoj instruas [21] *filozoj*, Horacio. — Rab 132,3 : Ĉu la pastraĉa babilaĵo povas kolerigi tian *filozofon* ?
- filozofi'** Ham 63,3 : en tio ĉi kuŝas io supernatura, se nur la *filozofio* povus tion ĉi eltrovi. — Rab 128,82 : Tio ĉi estas la *filozofio* de via malespero. — Rev 43,30 : Mi konfesas, mi mem amas iafoje *filozofii*.
- financ'** FK 302,16 : Esperanto, dank' al *financaj* malfacilaĵoj de la aŭtoro, aperis ... pli malfrue. — Rev 69,7 : moŝta sinjoro *financestro*. — Rab 71,8 : unu *financa* konsilanto, kiu vendadis honorajn lokojn.
- fizik'** Ekz 32,3 : *Fizikiston* oni ne povas nomi *fiziko*, ĉar *fiziko* estas la nomo de la scienco mem. — FK 207,21 : oni malfermis fakultaton de *fiziko*. — FK 94,23 : Al li ankoraŭ minacas morto, se ne *fizika*, tiam ankoraŭ pli terura - morala.
- fiziognomik'** Rab 56,19 : krias kontraŭ la *fiziognomiko*.
- fiziologi'** FK 207,29 : antropologian fakultaton por anatomio, *fiziologio*, higieno. — FK 279,20 : dependas de apartaj *fiziologiaj* ecoj de la organoj de parolo.
